komunikoj

JARO 33-a | JANUARO - FEBRUARO - MARTO | N-ro 133 2009

"Amu vian Dion
per via tuta animo
kaj vian proksimulon
kiel vin mem."
Jesuo

Naskiĝi, morti, renaskiĝi ankoraŭ kaj ĉiam progresi tia estas la leĝo.

La 15-an de Decembro 2008 Eldonejo Lorenz celebris sian 33an jaraĝon kaj ankaŭ 149 jarojn de la naskiĝo de la majstro Zamenhof.

Mauro Libânio, gvidanto de la kunveno, post la salutvortoj, invitis samideanon Ismael Miranda e Silva, reprezentanto de Brazila Spiritisma Federacio, fari la komencan preĝon. La Prezidanto de la Konsilantaro de Eldonejo Lorenz, Affonso Soares, prelegis reliefigante la neceson, kiel ĉiam Zamenhof atentigis nin, pri la unuiĝo de la esperantista movado kaj la Centjara Jubileo de Esperanto Ĉe FEB. La poetino kaj kantistino, Neide Barros Rêgo, riĉigis la programon per belaj kantoj kaj poemoj. Julieta Dulce prezentis retrospektivan ekspozicion pri la agoj de la Eldonejo en 2008. Alia interesa momento estis la ĉeesto de verkistoj de Eldonejo Lorenz, kiam ili ricevis omaĝon pro la kunlaborado dum tiuj 33 jaroj, ĉar ĉiuj donacis la aŭtorrajtojn por nia Eldonejo; inkluzive la verkisto, José Carlos Leal, ĉeestis kaj aŭtografis du ĵus lanĉitajn verkojn. Tamen, la plej grava momento estis ĉe la fino de la evento, kiam la mediumo Geralcino Gomes ricevis, psikografie, el la spirita mondo, mesaĝon de nia karmemora frato kaj samideano Ismael Gomes Braga, iam la ĉefa esperantista motoro en Brazilo, kies kompleta mesaĝo ni prezentos okaze de la lanĉo de Almanako Lorenz 2009 ĉe la Nacia kaj Universala Kongresoj de Esperanto. La harmonia kaj frata evento finiĝis per preĝo de Danilo Vilella.

ĈU VI JAM REKOTIZIS POR 2009?

Ne perdu tempon, aliĝu tuj kaj ricevu, en la komforto de via hejmo, du librojn, Almanakon Lorenz 2009 kaj nian trimonatan bultenon.

Koran dankon!

(21) 2221-2269/ editora_lorenz@uol.com.br

FEB, LORENZ, KONGRESOJ DE ESPERANTO KAJ LA NOVA NACIA ORGANIZACIO

Eldonejo Lorenz kaj Brazila Spiritisma Federacio jam konfirmis partoprenon en la ĉi-jara Universala Konkreso de Esperanto, en Bialistoko, kiam interalie oni memorigos pri la 150-a datreveno de naskiĝo de Zamenhof.

Sed plej grava ero de niaj ĉi-jaraj kongresaj aktivecoj montriĝos en la kadro de la 44ª BKE, en Juiz de Fora (MG), la 14-an de Julio, kiam FEB kaj Eldonejo Lorenz, sub prezido de la ĵus fondita ASSOCIAÇÃO BRASILEIRA DE ESPERANTISTAS-ESPÍRITAS, okazigos la 4-an Brazilan Renkontiĝon de Esperantistoj-Spiritistoj – BRES, pri kies ĉeftemo — CENTJARA JUBILEO DE ESPERANTO ĈE FEB — prelegos s-ano Affonso Soares, prezidanto de la Konsilantaro de Eldonejo Lorenz kaj direktoro de la Departemento pri Esperanto de FEB.

Ni, memkompreneble, kalkulas pri amasa partopreno de ĉiuj esperantistoj-spiritistoj en tiu plej grava, historia momento de nia Movado, jam nun petante pri konkreta apogo al la nova asocio, kiu viciĝos inter la organizaĵoj membrantaj en la Nacia Federacia Konsilantaro de FEB en la kategorio “faka asocio”.

Pri tiu treege signifoplena evento, Affonso Soares, Prezidanto de la Konsilantaro de Eldonejo Lorenz kaj respondeculo pri la Departemento de Esperanto ĉe FEB opinias: “Per tiu feliĉa iniciato, nome la fondo de ABEE, niaj jam centjaraj poresperantaj laboroj en la spiritistaj rondoj ricevos tiun nemalhaveblan forton, kiu nature fontas el ĉia centraliza kunordigado. Dio helpu, inspiru, subtenu la novan organizaĵon, al kiu certe aliĝos ĉiuj, kiuj ĝis nun laboradas por nia Triobla Idealo EEE!”

PRELEGO PRI F. V . LORENZ

Eldonejo Lorenz kaj FEB, ankaŭ en la kadro de la 44ª BKE, organizas alian riĉenhavan eventon ĉe Spiritisma Centro, kiam s-ino Sandra Ventura, el Braziljo, disvolvos temon, en la portugala lingvo, pri la vivo kaj verko de F. V. Lorenz, surbaze de la verko de Prof. José Carlos Leal, ĵus lanĉita de la Eldonejo Lorenz sub la titolo “O Homem Que Sabia Demais”. La fakto notinda estas la ĉeesto de la aŭtoro por aŭtografi sian libron.

La daton de la prelego ni sciigos en la proksima numero de Komunikoj.



KOMUNIKOJ

Se vi havas amikon, kiu ne havas komputilon kaj deziras ricevi, senpage, nian bultenon “Komunikoj”, skribu al ni kaj kun plezuro ni ĝin sendos.

editora_lorenz@uol.com.br

KURIOZAĴOJ

El la leteroj de Zamenhof



Al Majnov, 29.IV.1889

Estimata sinjoro!

Antaŭ momento mi ricevis vian letereton de 27/IV. Sendi al vi kelkan nombron da ekzempleroj por disdonaci al diversaj personoj — mi ne povas, ĉar mi ne estas riĉa kaj la libroj kostas min multe da mono; kiom mi nur havas la eblon mi jam dissendis mem senmone al multaj personoj en diversaj landoj. Ankaŭ doni sciigojn en la Novoje Vremja* mi ne povas pro manko de mono. — La eldonadon de ĵurnalo mi jam delonge komencus... se la ricevo de permeso ne estus tiel malfacila. — Se vi povas, mi kore petus vin sendi al mi la leteron de la profesoro Max Muller; post la tralego mi tuj ĝin resendos al vi.

• skribita ruslitere en la originalo, signifas: nova tempo; granda tagĵurnalo en S. Peterburgo.

Al Runstedt, 11.V.1889

Estimata Sinjoro!

En la monatoj Majo kaj Junio la "Nomaroj" ne povos esti eldonitaj. La plej proksima "Nomaro" eliros en Julio.

Kun estimo.

Esperanto.

Al Flekkel, 21.VIII.1889

Estimata Sinjoro!

La 4 rublojn mi ricevis; mi enskribis Vin en la nomaron de la abonantoj por la "Kolekto" kaj "Adresaro" kaj mi elsendis al Vi ankaŭ la verkojn pri kiuj Vi petis. Pri la irado de la afero. Vi povas sciiĝadi el la gazeto "Esperantisto". — Difinita frazeologio estas kun la tempo ellaborata per si mem. — Ĉiujn proponojn kiujn Vi havas, mi petas Vin sendi al la gazeto. — La "Kolekto" enhavas la plej multe nur rakontojn; sed ankaŭ kelkaj demandoj estos tie analizataj.

Kun kora saluto

L. Zamenhof

SUPERA JUĜISTO JÁCOMO MARTINS BAGGY DE ARAÚJO

Naskiĝo: 24/10/1848 Forpaso: 27/01/1912
Sta. Amaro – Bahia Urbo: Rio de Janeiro

Li vivadis dum 63 jaroj, 3 monatoj kaj 3 tagoj.

Vera pioniro, Baggy de Araújo estis la plej malnova brazila esperantisto; li disĵetis la unuajn semojn de propagando pri Esperanto en Brazilo. Li diplomiĝis pri leĝoscienco ĉe la jura Fakultato de Recife-PE, kaj plenumis la oficojn de ĵugisto en diversaj urboj de Brazilo: Feira de Santana-BA; Salvador-BA; Rio-Maranhão-GO; Paraíba do Sul-RJ; Petrópolis-RJ. Ricevinte kelkajn libretojn pri Esperanto de S-ro L. de Beaufront – Francio, li tralegis ilin kaj fariĝis tre fervora esperantisto. Al la fama ĵurnalisto Artur de Azevedo li sendis informojn kaj kelkajn broŝuretojn pri Esperanto. De tio rezultis ke A. Azevedo aperigis en la ĵurnalo "O Pais" – Rio de Janeiro, 12/03/1898, artikolon pri Esperanto en kiu li montris sin tre fervora al la nova internacia lingvo; liveris informojn, citis argumentojn kaj finis per transkribo de "Patro Nia" en Esperanto. Tiu preĝo estis la unua esperanta literaturaĵo kiun oni aperigis en Brazilo. A. Azevedo ankaŭ estis la unua brazila ĵurnalisto kiu sin montris favora al Esperanto. Baggy de Araújo estis skribita en la Adresaro de Esperanto de D-ro Zamenhof, serio XVIII, sub la n-ro 4098. Li bone posedis la francan lingvon kaj enskribiĝis en la franca "Societé pour la propagande de Esperanto". En la komenco de la libro "Esperanto Modelo" – Brazila Spiritisma Federacio – 1939, oni trovas fotografaĵon de Baggy de Araújo. Li varbis por Esperanto la faman esperantiston A. Caetano Coutinho. D-ro Baggy de Araújo estis unu el la fondintoj kaj la unua prezidanto de "Petropolisa E. Klubo", kaj tie disvastigis Esperanton inter siaj konuloj. Unu el liaj filinoj, Irani Baggy de Araújo, estis, dum multaj jaroj, sindona kasisto de BEL kaj tre fervora esperantisto. La tombo de D-ro Baggy de Araújo estas en la tombejo S. João Batista, urbo Rio de Janeiro-RJ. La esperantistoj rememoras ĉiam kun respekto kaj danko, la laŭdindan laboron de tiu eminenta kaj sindonema brazila samideano.

Alberto Flores

>>>>>>>>>>> DÉLIO PEREIRA DE SOUZA ELKARNIĜIS <<<<<<<<<<<

Kun bedaŭro ni sciigas la elkarniĝon de la kunfondinto de Eldonejo Lorenz kaj Asocio Esperantista de Rio de Janeiro, samideano Délio Pereira de Souza, 90 jara, la 2-an de Januaro/2009.

Kompletan biografion de nia amiko kaj frato, ni aperigos sur la paĝoj de Almanako Lorenz 2009.

ĜIS BALDAŬ, KARA AMIKO!



Finfine, post longa atendado, Brazila Spiritisma Federacio reeldonas ĉi-tiu mirindan juvelon.

Aĉetu tuj la vian!

Mendoj: editora_lorenz@uol.com.br

LA MALAMO

Amu unu aliajn, kaj vi estos feliĉaj. Prenu precipe kiel taskon ami tiujn, kiuj inspiras al vi indiferentecon, malamon kaj malŝaton. La Kristo, kiun vi devas fari via modelo, donis al vi ekzemplon de tiu sindonemo; misiisto de amo, li amis en tia grado, ke li fordonis sian sangon kaj sian vivon. La afero, kiu vin devigas ami la homojn, kiuj vin insultas kaj persekutas, estas dolora; sed ĝuste ĝi lokas vin super ili; se vi ilin malamus, kiel ili malamas vin, vi ne valorus pli ol ili; tia amo estas la senmakula hostio, kiun vi oferas al Dio sur la altaro de viaj koroj, hostio de agrabla odoro kaj kies parfumo suprenflugas al Li. Kvankam la leĝo de amo ordonas, ke ĉiu amu sendistinge ĉiujn siajn fratojn, ĝi tamen ne kirasas la koron kontraŭ la malbonaj agoj; ĝi, kontraŭe, trudas la plej doloran provon, kaj mi tion ja scias, ĉar en mia lasta surtera ekzistado mi spertis tian torturon; sed Dio estas ĉie kaj punas en la nuna kaj en la alia vivo tiujn, kiuj malobeas la leĝon de amo. Ne forgesu, miaj karaj filoj, ke la amo proksimigas al Dio, kaj la malamo malproksimigas de Li. (Fénelon, Bordeaux, 1861)

Libro: Evangelio laŭ Spiritismo
Ĉapitro XII – Amu Viajn Malamikojn

NIAJ LIBROJ JE VIA DISPONO!

Se alilandaj gesamideanoj deziros ricevi librojn de nia Eldonejo, skribu al ni kaj petu nian katalogon. Nur la sendokoston vi pagos; la libroj estas tute senpagaj.

LORENZ

SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ
Rua dos Inválidos, n. 34, grupo 903
Caixa Postal 3133 - CEP 20001-970
Rio de Janeiro (Brasil)
Tel. (21) **2221-2269** <editora_lorenz@uol.com.br>